

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

dimanĉon, la 3-an de Julio, 2011 • numero du

Venontaj eventoj

Dimanĉo (hodiaŭ)

- ★ **7:30 - 8:15 atm: Matenmanĝo**
en nia manĝejo,
Oceanview Terrace
- ★ **9:00 - 10:00 atm: Komuna kunsido** en nia klasĉambro en Asante
- ★ **10:00 atm - 12:30 ptm: Lecionoj**
- ★ **12:45 - 1:30 ptm: Tagmanĝo** en la manĝejo
- ★ **2:00 - 3:30 ptm: Promeno tra UCSD**
Ni vizitos kelkajn utilajn kaj/aŭ interesajn lokojn: vendejojn, bibliotekon, vestolavejon, kantantan arbon(!), ktp.
- ★ **3:30 - 6:00 ptm: LIBERA TEMPO!**
- ★ **6:00 - 6:30 ptm: Vespermanĝo**
- ★ **7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo**
Ray REDD prezentos pri la glaciepoko kaj la grandaj inundoj de la rivero Kolumbio



Lundo (morgaŭ)

- ★ **9:00 - 11:30 ptm: Lecionoj**
- ★ **2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj**
- ★ **4:30 - 5:45 ptm: Ekskurso al glisilejo**
- ★ **7:00 - 8:00 ptm: Ludvespero en Cuzco**
- ★ **8:30 - 9:30 ptm: Ekskurso por spekti artfajraĵojn!**

La NASKa Fasko


Redaktejo: Cuzco 117
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redakcejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Kien ni promenos hodiaŭ?

Ni ekiros de la loĝejoj je la 2-a ptm kaj sekvos la vojon sube (la linion el streketoj). La promeno estos mallonga – ĝi daŭros malpli ol duonhoron. Ni vizitos la plej gravajn apudajn lokojn: vestolavejon, vendejon, kafejon kaj eĉ trinkejon (kun biero por Bob). Post reveno al la loĝejoj, ni faros pli longan “turisman” ekskurson por tiuj, kiuj ŝatas promeni. Ni vizitos la lingvolaboratorion, skulptaĵon de la sun-dio, la belan bibliotekon Geisel, kaj aliajn vidindaĵojn – eĉ kantantan arbon! (Vidu mapon en paĝo 2.)





Konsiloj por novaj NASK-anoj

Lee MILLER (“Liĉjo”) estas multjara veterano de NASK. Li jam laboris kiel redaktisto, helpinstruisto kaj poste instruisto. Ĉi-jare li instruas en la postbaza kurso.

Mi bonvenigas vin al UCSD kaj NASK 2011. Vi troviĝas nun en vera komunumo de esperantistoj (en unu el la plej belaj lokoj en Usono!) kaj mi esperas ke vi ĝuos la venontan semajnon de studoj kaj amuzoj.

NASK ĉi-jare estas en nova “vesto”, nova strukturo: ĝi estas nur unu semajnon longa, kaj ĝi ne estas oficiala universitata kurso. Montriĝis dum pluraj jaroj ke niaj nombroj falas, kaj ni ekkonsciis ke ni ne plu povas allogi amason de homoj por trisemajna kurso. La kostoj estis tro altaj, kaj malmulte da homoj kapablas liberiĝi de laboro kaj aliaj devoj por tri semajnoj.


Tial ni eksperimentas en 2011. Ni interesiĝas pri viaj spertoj ĉi tie, viaj ideoj, kio plaĉas, kio ne plaĉas, kaj kion vi rekomendus por la estonteco. Efektive, kiel mi skribis en retroŝta mesaĝo, oni povas preskaŭ ĉion pri Esperanto lerni per Interreto aŭ lernolibroj, sed nur en viva grupo oni povas normale kaj ĉiutage aktive uzi la lingvon. Oni bezonas grupon kiel ĉe NASK por vere praktiki la lingvon buŝe kaj orele. Se vi havas ideojn pri kiel pli bone fari tion, nepre parolu kun ni.

Por mi, la ĉefa afero dum NASK estas la parola lingvo. Ĉi tie vi povas kaj aŭskulti diversajn voĉojn el diversaj landoj, kaj paroli pri plej diversaj ĉiutagaĵoj: en la apartamentoj, en la manĝejo, dum lecionoj, dum ekskursoj, en vendejoj—t.e., preskaŭ ĉie, pri ĉio. **Mi petas vin, ne silentu!** Eble vi ne perfekte parolas Esperanton, sed jen sekreto: **neniu perfekte parolas Esperanton!** Tamen, se vi volas progresi, gravas paroli, gravas fari kelkajn erarojn (“Eraru kuraĝe!”), kaj gravas ricevi klarigojn kaj korektojn de aliaj partoprenantoj. Mi tre dankas al kelkaj esperantistoj kiuj dum la

jaroj ĝentile diris al mi “Nu, Liĉjo, mi rimarkis ke vi diras X, sed kutime en Esperanto oni diras Y”. Al ili mi ŝuldas multon por mia kapablo uzi la lingvon pli bone.

Cetere, neniu demando estas stulta. Se vi ion ne komprenas, diru! Estas certe ke se vi ne komprenas, ankaŭ aliaj same ne komprenas. Ĝenerale, ni instruos kaj parolos nur en Esperanto. Sed la instruistoj kaj gvidantoj kapablas paroli angle (kaj kelkaj kapablas paroli alilingve), kaj vi rajtas fari demandon aŭ peti informon aŭ klarigon per alia lingvo ol Esperanto.

Ekster la lecionoj vi havos sufiĉe da tempo por esplori la terenon de UCSD, viziti proksimajn butikojn, ripozi, babili, legi, kaj ludi. Ne forgesu ke la semajno rapide pasos. Se vi ion volas fari, aŭ demandi, aŭ diskuti, ne prokrastu—eble ne restos sufiĉe da tempo. La semajno estas via. Uzu ĝin k.e.p. bone por atingi viajn celojn. Unu semajno ne sufiĉas, kompreneble, por ĉion pri Esperanto scii; sed ĝi ja estas sufiĉa por ion malkovri, por novajn amikojn fari, kaj por ĝui la etoson de viva Esperanto. Malkovru, amikiĝu, kaj ĝuu.



lundo, la 4-a	mardo, la 5-a	merkredo, la 6-a	ĵaŭdo, la 7-a	vendredo, la 8-a	sabato, la 9-a
9:00 - 11:30 atm: Lecionoj 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj 4:30 - 5:45 ptm: Grupa ekskurso 7:00 - 8:00 ptm Vespera programo 8:30 - 9:30: Grupa ekskurso	9:00 - 11:30 atm: Lecionoj 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo	Ekskurso-tago! Libera tago por longaj ekskursoj en la urbon, al la bestoĝardeno, ktp. 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo?	9:00 - 11:30 atm: Lecionoj 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo	9:00 atm - 12:30 ptm: Lecionoj 2:00 - 5:00 ptm: Grupa ekskurso 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo	9:00 - 11:30 atm: Lecionoj 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj? 7:00 - 9:00 ptm: Adiaŭa festeto
Provizora plano por la semajno					